

BAVKAZA

# ESPERANTISTA



Duonmonata literatura kaj propaganda gazeto.

Двухнедѣльникъ.  
Երկօրօրյայրերը.  
երկօր. շաբաթը

№ 9

BAVKAZĀNĀ  
ESPERANTISTĀ

1910 J.

I J A R O

15/28 de Julio.



Ploris anĝeloj... argentaj larmeroj  
 Falis senbrue sur teron malvarman:  
 Agoj malicaj de homa vivado  
 Premis ilian animon liberan.

Juna knabino lazuramatene  
 Branĉon florantan ekvolis deŝiri:  
 Arbo dormplena per reso argenta  
 Ŝiajn okulojn surverŝis ameme.

Vjaĉeslav Jegorjev.

Elruse esperantigis D-ro Andreo Fiŝer

D-ro Andreo Fiŝer, fama esperantisto kaj Kaŭkaza Cenzoro de la lingvo Esperanto.



▶ Тавъ какъ журналъ „Кавкаскій Эсперантистъ“ съ № 10 будеть печататься въ собственной типографіи „Эсперанто“, то можеть быть этотъ номеръ немного опоздаеть выходомъ. Во всякомъ случаѣ со слѣдующихъ номеровъ дѣло изданія будеть вполне урегулировано.

Որովհետև հովվանան հասկերանխարժ № 10-ից կը տպագրուի սեփական հասկերանտո տպարանում, կարող է պատահել որ այն համարի լրի տեսնել փոքր ինչ ուշանայ: Յամենայն դեպս հետևեալ համարներէջ հրատարակութեան գործը բոլորովին կը կանոնաւորուի:

რადგანაც ჟურნალი „ეპერანტისტი“ კსპერანტისტის „შე-10-ე“ ნომრიდან დაიბეჭდება საკუთარ „ეხსენარანტო“ სტამბაში, შესაძლოა, რომ ამ ნომრმა ცოტა დაიგვიანოს. უოველ შემთხვევაში შემდეგ ნომრებიდან გამოცემის საქმე აქნეუა ისევე ნორმალურად აღდგენილი.

Redakcio

## ! „EN BORJOM“

Murmureto de belaj arbaroj,  
Kant'—pepado de gajaj birdet',  
Dum la nokto—brilanta stelaro.  
En ĝardenoj—amindaj rozet';

Inter montoj kristala rivero,  
Kie ludas argentaj fiŝet';  
Malvarmeta kaj freŝa aero  
En herbejo, sur verda montet'.

Jen do arboj per floroj kovritaj,  
Akvovalo bruanta de mont';  
Per amaso de hom' ĉirkaŭitaj  
Jen sanigaj beletaj du font'.

Junularo senzorga, vivplena  
Babiladas kredeme en rond'  
De ĉielo do suno solena  
Favorege rigardas je mond'.

Borjom.

F-ino P. Pavlova

N. A. Z. O. \*)

De Gogol

II

Kolegia asesoro Kovalev. vekigis sufiĉe frue farinte laŭ sia kutimo per la lipoj: „brrr...“ kion li faris ĉiam, kiam li vekigis, kvankam li mem ne sciis, kial li tion faras. Kovalev sin eltiris kaj ordonis alporti al si malĝrandan spegulon, starintan sur la tablo. Li ekvolis tien enrigardi por ekvidi la akneton, kiŭ hieraŭ vespere montrigis sur lia nazo; sed al sia granda mirego li rimarkis en la spegulo, ke li, anstataŭ la nazo, havas nur glatan lokon! Ektimiĝinte, Kovalev ordonis alporti al si la akvon kaj frotis per yizaĝtuko la okulojn: certe, vere, malestas la nazo! penis Kovalev. Li komencis palpi la glatan plataĵon per la mano, pinĉis sin, por ekscii, ĉu li ne dormas. La kolegia asesoro elsaltis el la lito, ekskuiĝis,—sed la nazo efektive estis perdisiginta... Li ordonis alporti al si tuj la vestaĵojn kaj sin vestinte li preskaŭ forflugis rekte al ĉefpolicestro.

Sed dume estas ne cese diri ion pri Kovalev, por ke la leganto povu vidi kiaspeca estis ĉi-tiu kolegia asesoro. La kolegiajn asesorojn, kiuj ricevas ĉi-tiun oficon per helpo de l'sciencaj diplomoj, oni ne povas kompari kun tiuj kolegiaj asesoroj, kiuj fariĝas en Kaŭkazo. Ĉi-tio estas du diference distingitaj specoj.

La instruitaj kolegiaj asesoroj... Sed la Ruŝujo estas tia mirinda lando, ke se oni ion diros pri unu kolegia asesoro, tiam ĉiuj kolegiaj asesoroj, komencante de Rigo (urbo) ĝis Kamĉatka (insulo), komencos fanfaroni, kvazaŭ vi pri ili ĉiuj tion diris, ankaŭ tiel same okazas kun ordenoj kaj rangoj.

Kovalev estis Kaŭkaza kolegia asesoro

\*) Rig. 8-an numeron de „K. Esper.“

ró. Li nur du jarojn estis en la nomita ofico, kaj pro ĉi-tio li ne povis ĝin forgesi eĉ dumunu minuto; kaj ankoraŭ al tio, por aldoni al si noblecon kaj oficepezon, li neniam sin nomis simple kolegia asesoro, sed li ĉiam sin nomis majoro.

„Aŭskultu, amindulino“, diradis li ordinare, renkontante sur la strato la virinaĉon, vendantan duonĉemizojn:

„Vi venu al mi hejmen; mia loĝejo sin trovas sur Sadovaja strato; vi nur demandu tie iun pri mi—tiamaniere: ĉu ĉi-tie loĝas majoro Kovalev?—al vi tuj ĉiu montros mian loĝejon“.

Se li renkontadis iun beletulinon, li ĉiam donadis al ŝi, krom ĉi-tio, la sekretan ordonon, aldonante: „vi nur demandu, karulino, la loĝejon de majoro Kovalev“.

Laŭ ĉi-tiu dirinta, ni plue nomos la kolegian asesoron majoro Kovalev. La majoro Kovalev havis kutimon ĉiutage promeni sur la Nevskij prospektó.

La kolumo de lia duonĉemizo ĉiam estis tre pura kaj amelita. Li havis tiajn vangharojn, kiajn oni eĉ nun povas ekvidi ĉe guberniaj kaj distriktaj termurzistoj, ĉe arkitekturistoj kaj regmentaj doktoroj, kaj ankaŭ ĝenerale ĉe tiuj homoj, kiuj havas vangrúĝojn kaj bone scias ludi bostonon; ĉi-tiuj vangharoj kreskas sur la mezo de vangoj kaj rekte aliras ĝis nazo. La majoro Kovalev ĉiam portadis kun si multe da sigeliloj kun ia ajn insignoj kaj ankaŭ aliajn sur kiuj estis gravurita merkredo, jaŭdo, lndo, k. c... Majoro Kovalev alveturis Peterburĝon pro unu bezono—nome—serĉi konvenan lokon por sia rango. Se lia serĉado estos sukcesplena tiam li nepre volus trovi vic-guberniestran postenon, se ne, tiam almenaŭ ekzekutistan oficon—en ia rimarkebla departemento.

La majoro Kovalev tute ne estis kontraŭ edziĝo, sed nur en tia okazo, kiam

la fianĉino havas ducent mil rublojn.

Kaj nun, estimata leganto, vi povas mem ĵuĝi, en kian situacion estis jetita ĉi-tiu majoro, kiam li ekvibis sur sia vizago anstataŭ sufiĉe bona nazo, malsaĝan glatan kaj platan lokon. Kvazaŭ spite je l' malfeliĉo, li ne renkontis sur la strato eĉ unu vefurigiston, kaleĉiston, kaj li vole-nevole devis iri piede, envolviĝinte en sian mantelon, kovrinte sian vizagon per naztuko kaj krom tio farinte tian mienon, kvazaŭ el lia nazo iris sango.

„Eble al mi nur ŝajnis, ke mi perdis la nazon, ĉi-tio ne povas esti“, pensis li kaj intence eniris kónfitaĵejon, por enrigardi en spegulon. Feliĉe, en la kónfitaĵejo neniu estis: knabaĉoj balais la ĉambrojn kaj ordigis la seĝojn; iuj kun dormitaj okuloj elportadis sur la pletoj varmegajn kuketojn; sur la tabloj kaj seĝoj sin trovis superversitaj de kafo hieraŭaj gazetoj.

„Nu, gloro al Dio, ke ĉi-tie neniu estas, elparolis Kovalev: „nun mi povas enrigardi en la spegulon“. Li timeme aliris al la spegulo kaj enrigardis tien.

„La diablo nur scias, kia abomenaĵo estas!“ elparolis Kovalev kraĉinte: „kvankam ho estu io anstataŭ la nazo, sed kvazaŭ spite, estas nur unu abomena glataĵo!“. Kun ĉagreno mordante la lipojn, li eliris el kónfitaĵejo kaj decidis, kontraŭ sia kutimo, nek rigardi kaj nek rideti al siaj konataloj. Subite li haltis kvazaŭ enterigota ĉe l' pordo de unu domo; antaŭ liaj okuloj fariĝis neklarigebla okazaĵo; apud alveturejo haltis unu kareto; ĝiaj pordetoj malfermiĝis; ia sinjoro en uniferno elsaltis el la kareto, eniris domon kaj supreniris je la ŝtuparo. Kia teruro kaj mirego ekregis lin, kiam li ekkonis la nomitan sinjoron. Li estis la propra nazo de Kovalev! Antaŭ ĉi-tiu eksterordinara vidaĵo, al li ŝajnis, ke en liaj okuloj ĉio ŝanĝiĝis; li

sentis, ke li apenaŭ staras; sed malgraŭ tio, ke li eksentis febron li decidis nepre atendi la revenon de tiu-ĉi mirinda homo en la kareton. Post du minutoj la nazo efektive revenis. Li estis en ore brodita uniformo kaj kun granda staranta kolumo; sur la piedoj de tiu-ĉi homo estis ŝamaj pantalonoj; sur la flanko pendis unu spado. Laŭ la ĉapelo kun plumoj, oni povus konkludi, ke li estis en la rango de regna konsilanto. Laŭ eksteraĵo oni povus rimarki, ke li veturis al iu por viziti. Li ĉirkaŭ rigardis kaj dirinte al veturigisto: „alveturuli“ sidigis en la kareton kaj forveturis. Mal-feliĉa Kovalev apenaŭ frenezigis. Li eĉ ne scias kiamaniere kompreni ĉi-tiun strangan farigon. Kiamaniere do kompreni; nu, ĉu estas efektive, ke la nazo, kiu hieraŭ estis sur lia vizaĝo, kaj povis nek iri kaj nek veturi, hodiaŭ vestis uniformon. Li kuris post la kareto, kiu, feliĉe haltis tre malproksime, antaŭ la Aĉetejo. Li rapidegis tien, trarampis tra unu vico de l' almosulinoj kun bondaĝitaj vizaĝoj kaj po du truoj por okuloj kiujn Kovalev antaŭe tre mokis. La popolo sur la strato preskaŭ malestis. Kovalev estis en tia malbona humoro, ke li nenion povis fari kaj nur serĉis en ĉiuj anguletoj per la okuloj la mirindan sinjoron. Fine, li ekvidis lin, starantan antaŭ unu magazeno. La nazo tute kaŝis sian vizaĝon en granda starantan kolumo kaj kun granda atento rigardis iajn komercaĵojn.

„Kiamaniere alproksimiĝi al li?“ pensis Kovalev; „laŭ lia eksteraĵo mi konkludas, ke li estas regna konsilanto. Nur djablo scias, kion nun fari, komenci!“

Li komencis tuseti antaŭ la nazo; sed la nazo tute ne turnis atenti lin.

„Estimata sinjoro“, diris fine Kovalev interne sin devigante kuraĝi: „Estimata sinjoro!..“

„Kion vi volas?“ respondis returniginte la nazo.

„Al mi estas strange, estimata sinjoro, al mi ŝajnas... vi devas scii vian lokon... Kaj subite mi vin renkontas kie?... Konsentu kun mi!“

„Pardonu min, mi nenion komprenis pri kio vi ekvolis paroli... Klarigu, bonvolu!“

„Kiamaniere mi devas al li klarigi mian situacion?“ pensis Kovalev kaj kolektinte la kuraĝon, li komencis:

„Certe, mi... cetero, mi estas majoro; Al mi vivi sen la nazo, konsentu kun mi estas ne konvene. Eble al iu vendistino, kiu vendas sur la Voznesenskij ponto purigitajn oranĝojn estas eĉ konvene vivi sen nazo; sed al mi, kiu devas ricevi.... kaj krom tio mi ofte vizitadas multajn miajn kamaradojn; mi konas la sinjorinojn, nome: Ĉeĥtareva, edzino de regna konsilanto, kaj aliaj...“

Vi mem juĝu.... Mi ne scias, estimata sinjoro, (kaj dum tio-ĉi la majoro Kovalev levis la ŝultrojn)... pardonu... se ĉi-tion rigardi konforme kun la reguloj de l' devo kaj honoro... vi mem tiam povos kompreni...“

„Mi tute nenion komprenas“, respondis la nazo.

„Klarigu al mi la aferon pli kontentige!“

Elrusigis V. Gogitidze

(Daŭrigota).



## NI FRATOJ ESTAS

Naskigis ni en la diversaj landoj,  
Kaj vivas disjetitaj ĉiuloke,  
Esprimas diverslingve parolante...  
Ni tamen fratoj estas reciproke.

Neni' disigi povas nin,—nek spaco,  
Nek religi', nek moroj, nek malamo;  
Hodiaŭ jam batalo, morgaŭ paco,  
Sed iam regnos por eterne l' amo...

Nun malamikoj, poste malteruraj  
Ni estos anoj de l'mondfamilio.  
Do estu bonpatrin' por ni l' naturo,  
Espero—la gvidant' de l' nia vivo...

Parolu unulingve, popularo!  
Kaj estu unuig' por vi l' devizo,  
Por krei la feliĉon por homaro,  
Por krei la surteran paradizon.

Ŝrind

## Al Esperantaj gazetoj!

Multaj redakcioj de esperantaj gazetoj, sendinte al ni siajn gazetojn, petis interŝanĝi ilin. Ni akurate sendas al ili la numerojn de „Kaŭkaza Esperantisto“, sed nun ni rimarkis, ke kelkaj el ili ne estas akurataj kaj ne sendas siajn gazetojn. Ni anertas ilin, ke se ili ne volas interŝanĝi, ni ne sendos nian gazeton.

Redakcio.

Parolado de D-ro L. L. Zamenhof ĉe la solena malfermo de la Prepara Konferenco de Ruslandaj esperantistoj en Peterburgo,

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! Vi eble miros, ke mi parolas al vi ne ruse, sed Esperante; vi eble diros, ke ĉar ni havas nun kongreson de samregnanoj kaj ĉiuj, aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj komprenas tre bone la saman lingvon, estus multe pli nature

paroli al ili en tiu lingvo. Ekzistas laŭmen gravaj kaŭzoj, pro kiuj mi elektis por mia parolo tiun lingvon, por kiu ni batalas kaj pro kiu ni kunvenis.

Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukan. Esperantistoj, disjetitaj en diversaj urboj kaj urbetoj, kunvenas en pli aŭ malpli granda amaso, por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis la lingvon, ĉu ili bone ĝin komprenas, por kompari sian propran manieron de parolado kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj. Kiam ili poste revenas hejmen, ili ne sole mem parolas pli pure, sed ili alportas modelon de bona parolado al tiuj, kiuj restis hejme. Tiamaniere la kongresoj reguligas la uzadon de la lingvo, kaj dank' al niaj kongresoj jam nun oni parolas Esperanton perfekte egale ne sole en la plej malproksimaj anguloj de ĉiu aparta regno, sed en ĉiuj plej malsamaj lokoj de la tuta tera globo. Jam nun, kiam oni aŭdas bonan kaj spertan Esperantan oratoron, oni neniel povas diveni, al kiu nacio aŭ lando li apartenas. La plena aŭtonomia vivo de nia lingvo, kun ĝia absolute propra, ne pruntita kaj ne imitita spirito, ĉiam pli kaj pli fortikiĝas tiamaniere, kvazaŭ ĉiuj esperantistoj de la mondo loĝus kune sur unu malgranda peco da tero.

Ne malpli grava estas la e d u k a signifo de la esperantistaj kongresoj. Izolitaj esperantistoj, kiuj neniam havis la eblon praktike apliki tion, kion ili lernis ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas tute bone interkomprenigi. Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli Esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi

sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria, ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn Esperantistajn oratorojn, kiam li per siaj propraj oreloj kaj okuloj konvinkigas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke li laboras por io viva kaj vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio. Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la lokaj tiamaniere edukas konvinkitajn, sekve ankaŭ entuziasmajn batalantojn por nia afero.

Tio estas la ĉefaj motivoj, pro kiuj ni en ĉiuj niaj kongresoj, ne sole en la universalaj, sed ankaŭ en la naciaj aŭ regionaj, nepre devas paroli ne sole pri Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto.

Sed se en ĉiu nacia kongreso esperantista la Esperanta parolado estas tre dezirinda, ĝi estas ankoraŭ pli dezirinda speciale en nia regno, en la vasta Ruslando. Nia grandega regno, kiu etendiĝas de la Karpatoj ĝis la paca Oceano kaj de la "malvarmaj Finnaj rokoj ĝis la flama Kolhigo", nia regno estas tiel mikskonsista, ke ĉiu tutruslanda kongreso estas iom simila al kongreso internacia. Miksita estas la loĝantaro ankaŭ en aliaj regnoj, sed tie la karaktero de la reciprokaj, rilatoj inter la popoloj estas alia ol ĉe ni.

Mi ne volas ĉi tie analizi la kaŭzon de ĉi tiu fakto, ĉar tio devigus min eniri en regionon politikan, kion mi deziras eviti; mi nur konstatas la fakton. Pro la ekzistado de tiu fakto, dum longa tempo ankoraŭ en nia regno ne povos okazi kongresoj efektive tutruslandaj, en kiuj kun plena volonteco kaj plena sincereco partoprenus ĉiuj popoloj de la Ruslanda regno. Ankoraŭ dum longa tempo efektivaj kaj sincere partoprenataj kongresoj de la ruslandaj popoloj

povos okazi nur sur fundamento neŭtrala. La unua el tiaj kongresoj estas la nuna tutruslanda kongreso esperantista. En la kongreso, kiu nun malfermiĝas, ne ekzistos konkurantoj kaj malamikoj, ne ekzistos humiligantoj kaj humiligatoj, ekzistos nur samideanoj kaj samregnanoj. Tial mi ĝoje salutas la unuan Ruslandan Esperantistan kongreson; mi salutas ĝin duoble: kiel esperantisto kaj kiel Ruslandano.

Ne granda estas nia nuna kongreso, ĉar oni komencis ĝian preparadon tro malfrue. Tre malmulte da ruslandaj esperantistoj partoprenas en ĝi; tre malmulte da ruslandaj popoloj havas en ĝi siajn reprezentantojn. En efektiveco ĝi estas nur komenco kaj provo, ĝi estas nur prepara paŝo por la estontaj ruslandaj esperantistaj kongresoj. Mi tamen ne dubas, ke nia prova kongreseto ne restos sen utilo por la esperantismo en Ruslando. Malgraŭ niaj malgrandaj fortoj, mi esperas, ke la kunvenintaj samideanoj povos meti kelkajn fundamentajn ŝtonojn, sur kiuj poste konstruiĝos ĉiam pli kaj pli grandioza ruslanda esperantismo.

Mi esperas, ke dank'al nia penado ni baldaŭ ne bezonos honti antaŭ la eksterlando kaj nia afero staros en nia regno tiel same bone kaj fortike, kiel en aliaj landoj. En bona horo mi komencu nian laboron!

„Ondo“



## POR NIAJ LERNANTOJ

Tri papilioj.

(El la armena lingvo).

Estis aŭtuno; pluvetis; tri papilioj, — ruĝa, blanka kaj flava restis sub la plu-

vo. Longe ili flugadis, ekvidis tulipon; alproksimiĝis al ĝi kaj petis tiel:

—Tulipo, kara tulipo, malfermu viajn florfolietojn, akceptu miajn lacajn kamaradojn. Rigardu, la pluvo estas malsekiginta nin, ni malvarmumas, tremas, ni havas nenian rifuĝejon por eniri. Nu do, rapidu, ruĝa tulipo, malfermu viajn florfolietojn.

—Bone, mi donos lokon al la ruĝa papilio, sed al la flava kaj blanka papilioj mi ne donos.

—Mi ne disiĝos de miaj kamaradoj, —diris la ruĝa papilio; —estas pli bone al ni kune resti, kune malsekiĝi, kune morti, ol mi vivu sola, sen kamaradoj. La tri papilioj foriris; en la herbarjo ili ekvidis lilion, alproksimiĝis al ĝi, kaj petis ili tiel:

—Lilio, kara lilio, malfermu viajn florfolietojn, donu lokon al miaj lacaj kamaradoj. Rigardu, la pluvo estas malsekiginta nin, ni malvarmumas, tremas, ni havas nenian rifuĝejon por eniri. Nu do, rapidu, blanka lilio, malfermu viajn florfolietojn.

—Bone, mi donos lokon al la blanka papilio, sed al la flava kaj ruĝa papilioj mi ne donos.

—Mi ne disiĝos de miaj kamaradoj, —diris la blanka papilio; —estas pli bone kune resti, kune malsekiĝi, kune morti, ol mi vivu sola, sen kamaradoj.

La tri papilioj foriris denove; tiam ili fojlon ili ekvidis narcison, alproksimiĝis al ĝi, kaj petis tiel:

—Narciso, kara narciso, malfermu viajn florfolietojn, donu lokon al miaj lacaj kamaradoj. Rigardu, la pluvo estas malsekiginta nin, ni malvarmumas, tremas, ni havas nenian rifuĝejon por eniri. Nu do, rapidu, flava narciso, malfermu viajn florfolietojn.

—Bone, mi donos lokon al la flava papilio, sed al la ruĝa kaj blanka papilioj mi ne donos.

—Mi ne disiĝos de miaj kamaradoj, —diris la flava papilio; —estas pli bone kune resti, kune malsekiĝi, kune morti, ol mi vivu sola, sen kamaradoj.

La suno vidis tion de supre; ĝi vidis, aŭdis kaj laŭdis la amon de tri kamaradoj; ĝi forpelis nubojn, disigis pluvon, varmigis kaj sekigis la tri kamaradojn.

Tradukis S. Hajjan.

## НАШИМЪ ЧИТАТЕЛЯМЪ

Для болѣе широкаго распространенія языка Эсперанто, пользованья имъ и основательнаго изученія его, необходимо организоваться.

Мы получаемъ изъ разныхъ мѣстъ письма и статьи написанныя на эсперанто, и приходимъ къ такому заключеню, что тамъ, гдѣ нѣтъ Общества или группы, гдѣ каждый занимается отдѣльно, знаніе языка эсперанто очень отличается отъ тѣхъ, которые занимались группами. Въ этихъ послѣднихъ результаты занятія блестяще, т. е. непонятное одному объясняется другимъ. Какимъ же образомъ организоваться; въ настоящее время въ Россіи всякія собранія воспрещены, поэтому и надо организоваться на законномъ основаніи. Администрація безъ всякаго затрудненія разрѣшаетъ открытія эсперантскихъ обществъ.

Но есть болѣе легкій путь—это открытіе филиальныхъ отдѣленій „Кавказскаго Общества Эсперанто“. Для этого слѣдуетъ только собраться около 10 человекъ, написать на имя „Кавк. О-ва Эсп.“ письмо—прошеніе о разрѣшеніи открытія филиальнаго отдѣленія. О-ва (въ предѣлахъ Кавказа).  
1. Распоряженіе. Правленія „К. О. Э. то.“ имѣть законную силу, и поэтому по полученіи его, можно приступать къ

выборать председателя отделения, назначая—кассира, секретаря и 3 членов правления и начать работу. Среди членов новато О-ва по всей вѣроятности найдется лицо, хорошо знающее языкъ Эсперанто, который въ первое время и будетъ руководить группою, послѣ-же, когда будутъ руководители, можно открывать курсы языка Эсперанто.

Въ настоящее время имѣются много доступныхъ руководствъ и обширная литература, которую нужно пользоваться сейчасъ-же послѣ изученія языка. Совѣтуемъ читать вначалѣ классическія произведенія.

Редакція принимаетъ на себя снабжать всѣхъ подписчиковъ литературными произведеніями, а въ скоромъ времени будетъ открыта эсперантская книжная торговля.

Для того, чтобъ наши читатели двѣствительно пользовались языкомъ, безусловно нужно организоваться. Благодаря только организаций въ Тавризѣ, гдѣ годъ тому назадъ нельзя было найти эсперантистовъ, въ настоящее время есть не мало хорошихъ эсперантистовъ. Тоже самое можно сказать относительно Багума, Александрополя, Баку и проч...

**ՄԵՐ ԸՆԹԵՐՈՂՆԵՐՈՆ**

Էսպերանտոն աւելի ևս տարածելու և իսկ խաւերին մատչելի դարձնելու համար հարկաւոր է կազմակերպուել յոթովհետև միայն այդպիսով հարաւոր կը լինի լեզուն սովորել հիմնաւորապէս և ի հարկին գործադիր այլ և այլ նպատակներով: Ստանալով այլ և այլ տեղերից նամակներ և յօդուածներ Էսպերանտո լեզուով մենք գալիս ենք այն եզրակացութեան, որ այն տեղերում, որոնք Էսպերանտոն անհետական ընկերութիւններ կամ խմբակցական կազմակերպութիւններ կան յալթին ունեն, լեզուն աւելի են ըմբռն

եել և սովորել, քան թէ այն տեղերում, որտեղ այդպիսիները գոյութիւն չունեն: Վերջապէս ամենքին էլ լաւ հասկանալի կը լինի այն, որ երբ միասին պարզապէս, եթէ մէկը մի բան չը հասկանայ, միւսը կարող կը լինի բացատրել:

Միայն թիչպէս կազմակերպուել ներկայումս Ռուսաստանում համախմբութեան ու ժողովներն արգելուած են, ուստի և կարելի է գործել միայն օրինական հասակարեւոյ: Կառավարութիւնն անանց դժուարութիւնների թոյլ է տալիս էսպերանտոսական ընկերութիւնների հիմնադրութիւնը՝ բացումը:

Սակայն կայ և աւելի նեղ տիպից ընկերութիւն բանալով՝ դա Գոմիկանեան էսպերանտո: Ընկերութեան բաժանմունք բանալն է: Սրա համար հարկաւոր է միայն հաւաքուել ժողովներով, որի մի խնդիր Գոմիկանեան էսպերանտոն անուսով, որ նրանք թոյլ տան ընկերութեան բաժանմունքը բանալու (ի հարկէ Գոմիկանում միայն): Գոմիկ. էսպ. Ընկն կարգադրութիւնն օրինական այժմուսի և էնց որ ստացուի, անմիջապէս կարելի է հաւաքուել ընտրել մի նախագահ, գունձապահ, քարտուղար և 3 է: Կարգութեան անդամ և գործին ձեռնամուխ լինել ընկերութեան անդամների մէջ երեկ կը լինի մէկը որ փոքր ի շատէ կը դիտենայ էսպերանտոն: Նա կարող է ժամանակաւորապէս ղեկավար հանդիսանալ, նրան հօգնեն միւսները, իսկ երբ արդէն դաստաւած մարդիկ պատրաստ կը լինեն, կարելի է բանալ ամենէին գասընթացներ և ուսուցանել ցանկացողներն: Ներկայումս գոյութիւն ունեն բաւականաչափ մատչելի դասադրքեր և բաւական հարմուտ էլ գրականութիւն, որից կարելի է օգտուել սովորելուց անմիջապէս: Թրոհուող ենք տալիս սկզբներում կարգալ կլանիլ գրութեանը: որոնցով Եւրոպայ է էսպերանտո: Խմբագրութիւնն կը գերալ է վերցնում իր բաժանորդներին: Պատասխան է և ընթերցանութեան գրքեր մատակարարելու գործը, իսկ չուն



მად რაგვიხილს ღ ათაშნაძის ჭაყერანთა-  
 შან ერქანანი. **ქ.**  
 მქივეს ეს მხრ ლმწიკრებიანს ჩქა-  
 კეს თიღონს ქეთანს, ანუქან  
 შანს ხარქიათრ ღ ჯაჟანქერუილ-ქერ-  
 მსი. **ნ.** ხარქია ჯამართანს ღ ჯაჟან-  
 ქერუილთა ვარსკათანს. **ქ.** ანუქან  
 ჯაჟანს, იქ ხარქია მსქ თარს ანაჟ  
 ჯამარსა **ქ.** ჭაყერანთათა ჯიანს, ხერ-  
 ჯაიანა იანქ ჯა ჭაყერანთათანს,  
 ირანჟ თათა ვრქან სს, ჯაჟ ათაშნაძის  
 ერქანი. **ქ.** იქ რაგვი ღ ჯაჟანქანს  
 ღ ჯაჟანქანს ჯაჟანქანს, ჯაჟანქანს  
 სხრა ქარქიანსა **ქ.** ანუქან, **ქ.**  
 მსქანქარაჟი (ქაჟარან) ჯაჟანქ-  
 რქან ჯაჟანქ.

**ჩვენს მაიტხველვას**

ესპერანტულ მეგის უფრო ძლიერ  
 გასავრცელებლად მის სასარგებლოდ  
 და დაფუძნებითა შესასწავლებლად  
 უსაჭიროესია შეერთება ღმ შეერთებუ-  
 ლის ძალით საქმის დაწყება. ჩვენ მო-  
 გვდის სხვა და სხვა მხრიდან წერილე-  
 ბი და სტატიები ესპერანტულ ენაზედ  
 დაწერილები, და ჩვენ აქედან გამო-  
 გვყავს ისეთი დასკვნა, რომ იქ სადაც  
 არ არის საზოგადოება ანუ ჯგუფი,  
 ხადაც ყოველი მეცადინეობს ცალკე,  
 ესპერანტული ენის ცოდნა სდგას უფ-  
 რო დაბალ ნიადაგზე, ვიდრე იქ სა-  
 დაც მეცადინეობენ შეერთებულის ძა-  
 ლით ანუ ჯგუფებით. ძალიან სასარგე-  
 ბლოა ჯგუფებით მეცადინეობა; რად-  
 განაც „როცა“ რომელიმე მოსწავლერს  
 რაიმე არ ესმის, იმას აუხსნის მეორე  
 ამხანაგი. მაშ რანაირათ უნდა შეერ-  
 თება; ამ ხანად რუსეთში ვლადილუ-  
 ლია ყოველგვარი სკოლობები, ამი-  
 ტომ საქაროა; შეერთება კანონდებულ  
 დაწყობილებათუც, ამდინისტრაციას

ვილოდ აძლევს ნება-რთვას ესპერანტულ  
 საზოგადოებების დასაარსებლად. მაგ-  
 რამ არის უფრო ადვილი საწყობება;  
 ეს არის „კავკასიის“ ესპერანტულ სა-  
 ზოგადოების“ ფილიალურ განყოფილე-  
 ბების გახსნა. ამისთვის საჭიროა მხო-  
 ლოდ შეგროვდეს ათი კაცი და მოს-  
 წერონ „კავკასიის ესპერანტულ საზო-  
 გადოებას“ სახელზედ წერილი — თხოვ-  
 ნა ნება-რთვის შესაქმნათ საზოგადოე-  
 ბის ფილიალურ განყოფილების გახსნი-  
 სათვის. „კავკასიის ესპერანტულ საზო-  
 გადოების“ მმართველობის ნება-რთვას  
 აქვს კანონიერი ძალა და ამიტომ მის  
 შექმნის შემდეგ შეიძლება შეუდგნენ  
 განყოფილებებს თაფელდამარისა, ბაზი-  
 ნარისა, სეკრეტარისა, მმართველობის  
 პრეზიდენტისა, არქივას და საქმის დაწყობის.  
 პირველად წვერთა შორის შეიძლება  
 აღმოჩნდეს ისეთი პირი, რომელსაც  
 კარგად ეცოდინება ესპერანტული ენა  
 და ამ ჯერ-ჯერობით ამ პირს შემუქ-  
 ლიან ჯგუფის ხელმძღვანელობა. მხო-  
 ლოდ შემდეგში, როცა აღმოჩნდებიან  
 მკრდნე პირები შეიძლება კურსების  
 გახსნა. რედაქცია იღებს თავისზე მო-  
 ვალეობას გაუზაფეროს ყველა ხელის  
 მომწერლებს ყოველგვარი წიგნები და  
 ამ მოკლე ხანში გაიხსნება ესპერან-  
 ტული წიგნის საავტორო მალაზია.  
 ნათ. ვასილი ივან—ისა  
 LIBROJ RICEVITAJ  
 T. A. შავინსკი. — Полныи курс  
 международного языка „Эсперанто“ II  
 издание. Издание книги магазина „Эс-  
 перанто“. Москва 1910 г. ц. 80 р.  
 ჯიქანსანს ათაშნაძისს. — 71

Պատմութիւն հայոց արարեալ Ներսէսի  
Կարգապետի Գանձակեցոյ. Քիֆլիս 1910  
դ. 30 է.:

3. Պատմութիւն, գրական յոգովածու, հը-  
րատար. Մ. Էփրէիկեանի և Ն. Մկրտչի-  
անի. Քիֆլիս 1910, դ. 15 է.:

4. Մեծն Վարդան. սրբերգ. Յ գրք.  
Վահան Տիրացեանի. Քիֆլիս 1907 թ.  
դ. 50 է.:

## BIBLIOGRAFIO

Vortaro de Esperanto, verkita de Kabe  
(D-ro K. Bein), 1 vol. 175 paĝa, bin-  
dita; Paris, Hachette et C-ie, prezo:  
Fr. 4.

— Enciklopedia Vortareto Esperanta, kun  
klarigoj en Esperanto kaj franca tradu-  
ko, verkita de Ch. Verax, 1 vol., XVIII  
+ 249 paĝa, bindita; Paris Hachette et  
C-ie; prezo: Fr. 8.

Aperis du esperantaj vortaroj. La unua  
de Kabe, — estas vortaro de la komu-  
na lingvo. La dua — de Verax, — estas  
vortaro de teknikaj specialaj terminoj.

La vortaro de Kabe enhavas ĉiujn es-  
perantajn vortojn kun klarigo en Espe-  
ranto. Post la klarigoj tre ofte sekvas  
belaj ekzemploj, kiuj bonege ilustras la  
klarigojn. Tiu ĉi vortaro povas esti ba-  
zo, el kiu oni ĉerpos vortojn por naciaj  
vortaroj.

La Enciklopedia Vortareto de Verax ne  
enhavas multajn terminojn de la komuna  
lingvo, sed ĝi enhavas preskaŭ dudek  
mil teknikajn terminojn. Ili pres-  
kaŭ ĉiam estas klarigataj esperante, ĉiuj  
havas francan tradukon kaj, krom tio,  
la botanikaj kaj zoologiaj terminoj havas  
siajn latinajn nomojn. Tiu ĉi verko estas  
nomata "Vortareto" tial, ke ĝi enhavas  
nur ĉefajn vortojn de la scienco (kvan-  
kam ĝi estas pli granda, ol la uĉa vor-  
taro). Antaŭ la vortaro estas klar. al-

donoj, kiuj enhavas kemian, botanikan  
kaj zoologian nomenklaturon, interna-  
ciajn simbolojn, geologian nomaron kaj  
atompezojn.

La utileco de tiuj ĉi du verkoj estas  
senduba kaj ni rekomendas ilin al niaj  
samideanoj.

Ambaŭ vortaroj estas lukse eldonita,  
V. Sirunjan.

I. А. Шавинский. *Полный курс меж-  
дународного языка «Эсперанто»* 2-ое изд.  
книж. магазина "Эсперанто" в Москве  
1910 г. 96 стр. Цена 60 коп.

S-ro Шавинский давно уже известен  
въ Эсперантскомъ мирѣ какъ авторъ сис-  
тематическаго учебника языка Эспера-  
нто, изданнаго въ 1905 г. въ Мелитопо-  
лѣ, каковой являлся хорошимъ самоучи-  
телемъ языка Эсперанто, только въ немъ  
не было упражненій, хотя примѣры и  
приложенія могли замѣнить этотъ не-  
достатокъ.

Въ настоящее время передъ нами вто-  
рое изданіе того же учебника, совер-  
шенно переработанное и, авторъ на  
этотъ разъ ввелъ упражненія и многія  
другія дополненія. Книга въ себѣ за-  
ключаетъ всего 24 урока съ переводомъ  
упраженій. Уроки распределены на  
особые отдѣлы. I. Основныя граммати-  
ческія правила, II. Важнѣйшіе элемен-  
ты словообразованія: Специальныя пре-  
фиксы и суффиксы, и III. Повтореніе  
проядѣннаго въ связи съ систематиза-  
ціей частей рѣчи и видовъ словообра-  
зованія.

По нашему мнѣнію это единственное  
полное руководство для тѣхъ, которые  
занимаются безъ руководителей; въ о-  
собенности она во многомъ поможетъ  
интеллигентному человѣку.

Не лишнимъ считаемъ замѣтить, что  
авторъ далъ обширный, матеріалъ уп-  
раженій, между тѣмъ какъ, для болѣе  
правильнаго пониманія языка, желатель-

na законченная статья, а таковыхъ въ книгѣ всего три анекдота, что очень мало для человека, начинающаго изучать Эсперанто. Книга напечатана на хорошей бумагѣ, in—8, 90 стр. и стоитъ сравнительно не дорого.

Настоящую книгу мы рекомендуемъ не только начинающимъ, но даже всѣмъ русскимъ эсперантистамъ, какъ самое удобное руководство.

Hajk Ter-Ast.

## KRONIKO

Konstantinoplo (Turkujo). En Konstantinoplo estas fondita „Turka Esperanto Asocio“.

## HUMORAJA FAKO

—Sinjorino, la vendistino alportis paron da anseroj.

Unu el ili pezas dek funtojn, la alia dekdu.

Kiun el ili mi aĉetu por la ĉimanco?

—Aĉetu tiun, kiu petas dek funtojn. La doktoro ordonis al mi manĝi facilan nutraĵon.

—Ĉu vi vidis iam, sinjorino, Florencon?

—Mi ne scias, mi ne povas diri. Kiam ni vojaĝas, ĉiam mia edzo aĉetas biletojn.

La juĝisto:—Juĝato! Per kio vi batis la kapon de P' atestanto?

La juĝato:—Per nenio, sinjor' juĝisto.

La juĝisto:—Vi mensogas! Vido ne povis rompi lian kraniion nur per manoj!

La juĝato:—Certe, certe... sed mi lin prenis de la piedoj kaj ekbatis lin al la muro du fojojn...

—Aŭskultu, Stepan!... Ĉu vi ne scias kion oni faras, kiam oni volas suprenigi per aerostato?

—Ho, ĝi estas tre simpla afero... Oni forĵetas sakojn kun sablo unu post alia kaj suprenflugas.

—Kaj se oni volas malsuprenigi?

—Ankaŭ tio estas tre simple: oni enprenas sakojn kun sablo kaj malsupreniĝas...

—Kelnero, kion oni faras ĉe vi kun tiuj personoj, kiuj vespermanĝas sed ne pagas?

—Oni lin batas kaj ĵetas for.

—Sekve bafu ankaŭ min kaj forĵetu, ĉar mi ankaŭ ne intencas pagi.

Post longaj hezitoj aŭtoro' kurage eniris en redakcejon.

—Mi venis al vi, alportinte kun mi, mian lastan rakonton,—diris li al la redaktoro.

—Bonege,—respondis la redaktoro,—mi estas preta ĝin aŭskulti.

—Valeriano,—komencis la aŭtoro legi sian manuskripton,—staris senmove, kiel grafitrokego. Subite li falis genue antaŭ mirinde belega knabino kun pala vizaĝo, kiel alĉebastro. Ŝi, rigardante lin per siaj senvivaj okuloj, similaj al ŝtono, respondis, ke ŝia koro estas malvarma, kiel marmoro. Poste...

Sed la redaktoro lin haltigis kaj diris:

—Sinjoro, ŝajnas al mi, ke vi eraris. Ĉi tie estas redakcio. Sed vi kun via aĵo, devas iri en la najbaran metiejon de P' skulptisto.

Esperantigis V. Sirunjan.



## KORESPONDADA FAKO

En tiu-ci fakoj estas presataj adresoj de la personoj, kiuj deziras korespondadi kun gesamideanoj per simplaj poŝtkartoj (SP) aŭ per ilustritaj (PI) aŭ per leteroj (L) aŭ intersanĝi poŝtmarkojn (PM).

Barcelona (Hispanujo) Galle major dell Ganland № 56.

S-ro I. Plasencia, deziras korespondadi kun Rusaj Samideanoj. P. I. L.

Redaktono-Eldonisto: H. Ter-Astvacatjanc

## ANONCOJ

«KAŬKAZA ESPERANTISTO»

Jarabono 1 rublo—1.08 sm.

Tarifo por anoncoj: 1 paĝo—6 rub.,  $\frac{1}{2}$  pĝ.—3 r.  $\frac{1}{4}$  pĝ.—1 r. 50 kop.,  $\frac{1}{8}$  pĝ.—75 k.,  $\frac{1}{10}$ —50 k.

Adresoj de samideanoj 10 k.  
Adreso: Tiflis, Panaseviĉa str. № 1 Ajk  
Ter-Astvacatjanc.

„КАВКАЗСКИЙ ЭСПЕРАНТИСТЪ“

Въ годъ 1 рубль. Объявления: страница—6 руб.,  $\frac{1}{2}$  стр.—3 р.,  $\frac{1}{4}$  стр.—1 р. 50 к.,  $\frac{1}{8}$  стр.—75 к.,  $\frac{1}{10}$  стр.—50 к.

Адресъ: Тифлисъ, Панасевича ул. № 1  
Айку Тер-Аставацатрянцу.

«ԿԱՎԿԱՍԻԱՆ ԷՍՊԵՐԱՆԻՏԻՍ»

Տարեկան բաժանորդագինը 1 ռուբլի:

„ՅԱՅՅՅՅՆՈՆԸ ՁԵՅՁԵՅՅՅՅՅՆՈՆԸ“

Դրոշմանը ճան 1 մեթո.

Редакция открыта ежедневно по вечерамъ  
отъ 5—7 ч.

La Redakcio kaj Administrejo de  
„KAŬKAZA ESPERANTISTO“  
de la 1-a Julio transloĝigas sur Elizavetinskajjan str. domo de Prikaŝĉikov  
№ 17,

Редакция и контора газеты  
«КАВК. ЭСПЕРАНТИСТЪ»

Съ 1-го июля

перешелъ на Елизаветинскую  
ул. д. Прикащикова № 17.

## БДУЩИМЪ

## ЗА ГРАНИЦУ

Редакция журнала «Кавказский Эсперантистъ» оказываетъ

## Безплатно

посредствомъ Эсперанто всякія услуги: даетъ справки, рекомендаціи, указываетъ курорты, пансіоны, гостиницы и т. п., гдѣ говорятъ по эсперантски.

Читать, писать и говорить по Эсперантски можно научиться въ самое короткое время.

Справиться въ редакціи ежедневно отъ 5 до 7 ч. вечера.

СЪ 1-ГО ЮНЯ

даютъ частные уроки языка

## Эсперанто

Курсъ  $1\frac{1}{2}$  мѣс., занятія по вечерамъ. Плата всеѣмъ доступна.

Пріемъ ежедневно отъ 5—7 веч.

Справиться въ нашей редакціи.

Въ редакци журнала «**Кавказский Эсперантистъ**», Пушкинскій пассажъ и въ «Кавказскомъ О-вѣ Эсперанто» продаются слѣдующія книги:

1. Kato en botoj, tr. de V. Sirun. 10 k.
2. Hundo kaj Kato, " " 10 "
3. Rondaj Dioj, " " 3 "
4. Ekzercareto Esperanta, de V. S. 5 "
5. Nino, tr. de V. Gogitidze 3 "
6. *Դասագիրք Հիւշարկնո լեզուի, Հ. Տ. Աստուածատրեանի* 25 "
7. *Բանարկնի Հիւշարկնո-Հայերէն, Հ. Տ. Աստուածատրեանի* 50 "
8. Полный учебникъ Эсперанто, В. Сирунянъ . . . 12 "
9. Esperanta Helplibreto . . . 8 "
10. *Հիւշարկնո միջազգ. լեզուի, Ա. Օհանջանեանի* . . . 3 "
11. Esperanta Legolibro, de A. Fiŝer 30 "
12. I. Turgenjev. — Kanto de triumfanta amo, tr. de A. Fiŝer . 25 "
13. " Anjo (Ася) tr. de A. Fiŝer kaj V. Zamjatin . 25 "

14. Poŝtkartoj kun portreto de L. Zamenhof po 2 k. 100 eks. 1 r. 70 "
15. Серія изъ 8-и открытокъ, раскраш. рукою 25 коп.

При требовани болѣе 10 экз. дѣлается 20% скидка. Пересылка за счетъ покупателя.

Черезъ редакцію можно получить еще слѣдующія книги:

1. L. L. Zamenhof. Fundamento de Esperanto (gramatiko, ekzercaro, universala vortaro) . 80 k.
2. Fundamenta krestomatio, de la lingvo Esperanto . 1 r. 40 "
3. Proverbaro Esperanta . . . 60 "
4. Lingvoj respondoj . . . 30 "
5. La Revizoro de Gogol . . . 60 "
6. Don-Juan de Moljero . . . 60 "
7. La Avarulo de Moljero . . . 40 "
8. Esperanta vortaro de Kabe 1 r. 70 "
9. Enciklopedia vortareto Esperanta de Verax . . . 2 r. 50 "

ВЪ РЕДАКЦИ ЖУРНАЛА «КАУКАЗА ЭСПЕРАНТИСТО»

До 1-го Сентября

принимается подписка на

# ПОЛНЫЙ РУССКО-ЭСПЕРАНТСКІЙ СЛОВАРЬ

В. Сируняна

со многими объяснительными примѣрами. Цѣна до выхода въ свѣтъ въ Тифлисѣ 80 коп., а для иногороднихъ подписчиковъ 1 р. съ пересылкой. Подписавшіеся на 10 экз. получаютъ 11-ый безплатно.

Послѣ выхода изъ печати цѣна изданія будетъ повышена.

Художественная

ФОТО-ДИПЛОМАТИЯ

ФОТО-ДИПЛОМАТИЯ



С. А. СОГОМОНЯНА.

ИЗГОТОВЛЯЕТЪ



К Д И Ш Е

на цинкъ и мѣди для иллюстрированныхъ изданій и газетъ, прейсъ-курантовъ, газетныхъ объявленій, фирмовыхъ бланковъ, медалей, географич. картъ, плановъ, нотъ, fac-simile и пр. работы исполняются срочно.

Пушкинскій пассажъ, Тифлисъ.

Ս. ՍՈՂՈՄՈՆԵԱՆԻ ՊՍԻՄՈՆԻԱԿ Է ՎԵՐԵՆԵՐ գեղարեստական թերթերի, զատագրքերի և նման հրատարակութիւնների, կարտերի, նոտաների, ձեռագրերի, (Փար-սիմիլէ), յայտարարութիւնների և այլն: Պատկերաւոր բաց-նամակներ 1000-ը 15 ր. 2000-ը 25 ր. և աւելին գեղջերով:

Вышла изъ печати книга

# СЧЕТОВОДСТВО Обществъ взаимнаго кредита

(Полное, по двойной системѣ).

Составилъ А. АРУМОВЪ, основатель Второго Тифлискаго О-ва Взаимнаго Кредита.

Адресъ: Книгоизд. „Коммерческая Литература“, СПБ., Екатерингофскій просп., № 8.

La 15-an de Julio 1910 j.

Estos malfermita en Tiflis nova presejo «ESPERANTO»

Omi havos preslitterarojn: esperantajn, rusajn, armenajn, kartvelajn, francajn k. t. p.

Adreso de la 1-a julio: Elizavetinskaja strato № 17, d. de Prikaŝĉikov.



Съ 15 Юля 1910 года

Въ Тифлисъ открыв. новая типографія подъ фирмой

## Эсперанто

Шрифты на языкахъ: эсперанто, русскомъ, армянскомъ, грузинскомъ, французскомъ и проч.

Адресъ съ 1-го Юля: Елизаветинская ул. д. Прикащикова № 17.

30 JULY 15-18 1910 P.

Թիֆլիսում բացվում է նոր տպարան

„ԷՍՊԵՐԱՆՏՕ“ ԱՆՈՒՆՈՎ

Գունեակ սատրի ճեղուներով.

Էսպերանտո, ռուսերէն, արաբերէն, վրացերէն, ֆրանսերէն, և այլն:

Իր կատարէ ամեն սեռայ պատճեններ ամենամեծ հրատարակչով:

Հասցէն յուլիսի 1-ից. Միգանտինսկայա փող. տուն. Պրիկաշիկովի № 17.

15 ЮЛИ 1910 г.

თბილისში გაიხსნება ახალი ტაბა

„ესპერანტო“ ფირმით

ეჭნება ასრები ესპერანტულ, რუსულ, სომხურ, ქართულ და ფრანგულ ენებზედ.

შეასრულებს ყველა გვარ ზაკაზებს ხელმისაწვდენ ფასებში.  
ადრესი ივლისის 1-დან: ელიზავეტინსკაის ქ., სსლი პრიკაშჩიკოვის  
№ 17.